

# Francilia esperanta federacio

## Ĝenerala Asembleo 2021

### ĜENERALAĴOJ

La oficiala ĝenerala asembleo 2021 de la francilia federacio de esperanto okazis sabaton la 20an de marto, de la 2a ĝis la 4a posttagmeze. Pro la sansituacio, la ĜA okazis rete. 17 membroj partoprenis, plus unu, kiu donis anstataŭan permeson.

### REZULTOJ DE LA VOĈDONADO

La membroj voĉdonis rete per balotilo.org, krom 3 membroj, kiuj voĉdonis poŝte. La voĉdonado finiĝis la 18an de marto. La celo de la baloto estis aprobi la agadraporton kaj la financon raporton de la pasinta jaro, kaj elekti novan komitaton. La du raportoj legeblas en nia retejo ĉe <https://esperanto.paris/membro-kunvenoj>

Ricevintoj de balotilo: 124 rete kaj 7 poŝte, entute 131

Voĉdonantoj: 51 rete kaj 3 poŝte, entute 54

Elcento de partopreno: 41 %

Aprobo de la agadraporto: 49 aprobas, 1 ne aprobas, 4 sindetenas. Konklude la agadraporto estas aprobita.

Aprobo de la financa raporto: 46 aprobas, 0 ne aprobas, 8 sindetenas. Konklude la financa raporto estas aprobita.

Elekto de novaj komitatanoj:

La komitato enhavu inter 9 kaj 15 membroj.

- Michèle Abada-Simon: 48 voĉoj
- Pierre Gauthier: 46 voĉoj
- Marc Giraud: 51 voĉoj
- Didier Janot: 41 voĉoj
- Aurélien Lestage: 49 voĉoj
- François Lo Jacomo: 50 voĉoj
- Didier Loison: 51 voĉoj
- Marielle Martin: 46 voĉoj
- Laure Patas d'Illiers: 49 voĉoj
- Guillaume Vera-Navas: 49 voĉoj
- Frantz Vichot: 45 voĉoj

Konklude, ĉiuj kandidatoj estas elektitaj.

### FOIRO PRI MATEMATIKAJ LUDOJ

Pasintjare la foiro okazis nur rete kaj nia partopreno estis kontentiga. Ĉijare ĝi denove okazos de la 27a ĝis la 30a de majo.

Ĉu ni partoprenu la venontan matematikan foiron? Ĉiuj partoprenantoj jesas, do la decido estas

partopreni. Ni partoprenos rete, surloke, ambaŭ se eblos.

Atentu : necesos multe da homaj fortoj por deĵori, eĉ rete.

La filmo de la pasinta jaro estos reuzebla, kaj oni povos aldoni plian. Elizabeth Barbay proponas filmeton, kie ŝi instruas la nombrojn al infanoj, kaj ŝi diras sin preta helpi surloke.

La komitato prizorgos la detalojn.

## LOKAJ ASOCIOJ

Gravas ke homo interesata pri Esperanto kaj serĉanta proksiman klubon ricevu respondon de la respondeculo de la loka asocio priskribita en nia retejo <https://esperanto.paris>. La komitato demandis al la lokaj asocioj, ĉu ili plu aktivas, por se necese ĝisdatigi aŭ eĉ forigi ties paĝon en nia retejo.

- Espéranto 91 Essonne: neniu respondo.
- Espéranto 94: la asocio plu ekzistas sed malmulte aktivas, ni korektis la retadreson.
- Espéranto 78 Le Vésinet: ni pliriĉigis la paĝon per la nomo kaj retpoŝtadreso de Marielle Martin.
- ILO 78: neniu respondo, tamen ŝajnas ke ĝi plu ekzistas, Elisabeth Barbay kontaktos Anne-Sophie Markov por ricevi informojn.
- Bondy espéranto 93: ni ĝisdatigis la paĝon.
- Espéranto 77 Val de Seine: la asocio ne plu aktivas de multaj jaroj, ni forigis la paĝon.
- Espéranto Epinay Europe EEE 93: Gaston Riera plu aktivas, plej bone doni nur lian telefonnumeron.

Ĉu ni forigu la paĝojn de la asocioj 91 kaj ILO 78? La decido estas nea.

En 92 ekzistis asocio en Asnières kun Michèle Abada-Simon, la asocio mem ne plu aktivas, sed Michèle povus organizi kurson, se iu(j) interesiĝus. Tio similas al Bondy. Por la kluboj Asnières 92 kaj Bondy 93, ni publikigu paĝon kun mencio, ke la klubo nun ne aktivas sed eblas organizi kurson laŭ peto.

Pri 77, Raymonde Coquisart proponas, ke ni denove publikigu paĝon, sed kun ŝia propra retadreso [raymonde.coquisart@laposte.net](mailto:raymonde.coquisart@laposte.net)

Aleks Kadar proponas plej bonan solvon: la fonto de la informoj pri lokaj asocioj estu fakte ne nia retejo [esperanto.paris](https://esperanto.paris) sed la retejo de Espéranto France. En [esperanto.paris](https://esperanto.paris) ni publikigu nur ligilo(j)n al [esperanto-france.org](https://esperanto-france.org).

## KOMUNIKILOJ

La komitato anoncas la eventojn per multaj rimedoj: nia retejo <https://esperanto.paris> Facebook, Twitter, Telegram, Amikumu, Eventaservo, Duolingo, Meet-Up. Ĝi ankaŭ anoncas per dissendolisto al interesatoj.

La federacio uzas 3 dissendolistojn :

- [komitato-francilio@googlegroups.com](mailto:komitato-francilio@googlegroups.com) : la komitatanoj
- [membraro-francilio@googlegroups.com](mailto:membraro-francilio@googlegroups.com) : la oficialaj membroj, por maloftaj mesaĝoj kiel invito al la ĝenerala asembleo
- [amikaro-francilio@googlegroups.com](mailto:amikaro-francilio@googlegroups.com) : ĉiuj homoj kiuj interesiĝas pri niaj agadoj, nuntempe la eks-aligintoj de la listo ĉe Yahoo kaj la eks-membroj

Krome, Espéranto France disponigas plian dissendoliston [francilio@esperanto-france.org](mailto:francilio@esperanto-france.org) Ĝi nun povus esti uzata kiel listo de interesatoj, anstataŭ [amikaro-francilio@googlegroups.com](mailto:amikaro-francilio@googlegroups.com). Male, Espéranto France estas laboranta, por ke tiu listo anstataŭ nian liston [membraro-francilio@googlegroups.com](mailto:membraro-francilio@googlegroups.com) per aŭtomata ĝisdatigo el la datumbazo de la membroj de Espéranto France kiuj loĝas en Francilio.

La komitato petas de la membroj iliajn opiniojn pri la komunikiloj.

La decido estas: ne uzi la liston de Espéranto France ĝis la fino de ilia laboro aŭ ĝis la venonta ĜA, tiam ni repripensos la aferon. Notendas ke tiu decido gajnis la voĉdonon per 6 voĉoj kontraŭ 5.

La membraro kaj amikaro google listoj estas *dissendolistoj*, t.e. ke nur la komitato rajtas sendi mesaĝojn. Kelkaj membroj deziras kapabli sendi mesaĝojn al listo(j), por malfermi diskuton inter la membroj kvazaŭ forumo. Tiel ne temus pri *dissendolisto* sed *diskutlisto*. La decido, per 6 voĉoj kontraŭ 5, estas: ĉiuj membroj rajtos skribi en la listo [membraro-francilio@googlegroups.com](mailto:membraro-francilio@googlegroups.com).

Aleks Kadar petas ke ĉiu mesaĝo sendata de la komitato al iu ajn listo enhavu la nomon de la listo mem.

## **EVENTOJ DE LA PASINTA JARO**

La eventoj de la pasinta jaro estas priskribitaj en la agadraporto. Aldonendas ke okazis dum multaj vesperoj grupa laboro por prepari sonspektaklon, titolitan "Amseruroj", el la teatraĵo komune verkita kaj premiita de la Belartaj Konkursoj de UEA. La registrado ne povis okazi pro la trudita hejmrestado en marto 2020.

La komitato petas de la membroj iliajn rimarkojn pri la organizitaj eventoj.

Aleks Kadar informas, ke UEA alte taksas la agadon de la francilia federacio pri ĝemelaj urboj inter Parizo kaj Romo.

## **AGADPLANO**

La komitato prezentas agadplanon por la venonta jaro kaj petas la membrojn pri ideoj, helpoj por nunaj agadoj kaj novaj projektoj.

La agado pri ĝemelaj urboj plu okazos rete. Multaj kromaj agadoj estas antaŭviditaj, ekzemple informado en bibliotekoj, ĥoro, ludoj, ktp. ekde kiam ili eblas. François Lo Jacomo ŝatus scii, ĉu eblus reaktivigi la projekton de sonspektaklo "Amseruroj", tio multe dependas de Régis.

## **HELPOPETO**

Bruno Flochon, prezidanto de Espéranto France, informas ke Susanna Beglaryan, kiu respondecas pri la sidejo de Espéranto France, estas superŝutita de laboro kaj bezonas helpon. Ĉu parizanoj povus veni helpi ŝin en la sidejo? Espéranto France povas doni permeson por eliri el hejmo. Elisabeth Barbay kontaktos ŝin por proponi helpon pri pakado de libroj.

## **Konkludo**

La tagordo estas plenumita. La prezidanto dankas ĉiujn partoprenantojn. La ĝenerala asembleo finiĝas je 15:48.